# AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO (AEA)

AŬSTRALIA KONGRESO DE
ESPERANTO
–Adelajdo–
2025

Kongreso de Esperanto
kaj Somerkursaro

# 5 – 11 januaro 2025

## St. Ann's College

## Adelajdo, Aŭstralio

# SALUTMESAĜO

Bonvenon al Adelajdo.

Bonvenon al nia kongreso/somerkursaro de 2025.

La estraro de AEA refoje provis organizi kiel eble plej interesan Esperanto-eventon.

Ni bonŝancas pro tio, ke refoje ĉeestos Hoan Trần el Vjetnamio kaj Trevor Steele kaj Sandor Horvath el Adelajdo kiel instruistoj.

Ni speciale dankas ĉiujn partoprenantojn, kiuj prezentas erojn, gvidas aŭ organizas diversajn eventojn. Tiun ĉi kongreson organizas kaj okazigas manpleno da volontuloj. Se aŭ kiam okazas misaĵoj, bonvolu memori tion kaj estu ĝentila kun ili.

Memoru ke neniu el ni estas denaska parolanto de Esperanto. Estu pacienca kun komencantoj. Parolu kun ili kaj kuraĝigu ilin.

Ne forgesu fari belajn kaj interesajn fotojn dum la semajno kaj partoprenu nian fotokonkurson.

Nome de AEA, ni deziras al vi agrablan, amuzan, kaj fruktodonan tempon dum la somerkursaro kaj en Adelajdo.

Heather, Joanne, Jonathan, Sandor, Terry (AEA)

# FOTOKONKURSO

Faru elektronikajn fotojn **dum** la kongreso kaj **pri** la kongreso.

Sendu ilin al Jonathan (drdada@gmail.com).
Certigu, ke la foto(j) ne estu pli granda(j) ol 5MB. Maksimume 10 fotoj de ĉiu konkursanto.

Limdato:

**Ĵaŭdo, la 9a de januaro 2025, je 19:30**

La fotoj estos montrataj dum la lasta vespero (vendredon, la 10an de januaro) kaj la tri plej bonaj gajnos premiojn.

# Adelajda Kongreso: dimanĉo, 5a – sabato, 11a de januaro 2025

| | Dim 5 | Lun 6 | Mar 7 | Mer 8 | Ĵaŭ 9 | Ven 10 | Sab 11 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 07:00 | | | | | | | |
| | | Matenmanĝo | Matenmanĝo | Matenmanĝo | Matenmanĝo | Matenmanĝo | Matenmanĝo |
| 08:00 | | | | | | | |
| | | | | | | | |
| 09:00 | | Malfermo | | | | | |
| | | | Esperanto-kursoj | Esperanto-kursoj | Esperanto-kursoj | Esperanto-kursoj | Bonan vojaĝon |
| 10:00 | | Kafopaŭzo | | | | | |
| | | | Kafopaŭzo | Kafopaŭzo | Kafopaŭzo | Kafopaŭzo | |
| 11:00 | | Esperanto-kursoj | | | | | |
| | | | Esperanto-kursoj | Esperanto-kursoj | Esperanto-kursoj | Esperanto-kursoj | |
| 12:00 | | Komuna foto #1 | | | Komuna foto #2 | | |
| | | | | | | | |
| 13:00 | | Tagmanĝo | Tagmanĝo | Ekskurso | Tagmanĝo | Tagmanĝo | |
| | | | | | | | |
| 14:00 | | Baza universala enspezo | Velingtono / 3ZZZ | Glenelg | La epoko de l'elektro | Aruŝo *Heather* | |
| | | *Sandor* | *David Ryan* / *Franciska* | | *Benno Lang* | Aruŝo *Vere* | |
| 15:00 | | Ĉu historio? *Helen* | Rakontoj, poemoj | Bay | Germanoj *Marumi* | Skota lingvo *William* | |
| | Alveno | Kafopaŭzo | Kafopaŭzo | Discovery | Kafopaŭzo | Kafopaŭzo | |
| 16:00 | | Aŭstralia karaktero | Kiel fari pli bonajn fotojn | Centre | 4 Kantoj / 3ZZZ | Alternativa | |
| | Registrado | 3ZZZ-legado *Franciska* | Kreado de / 3ZZZ- | | *Kam* / *Franciska* | Diservo | |
| 17:00 | | AEA- | poŝtkartoj / Legado | | Kanbero *Sarah* | Dulingva poezio | |
| | | Jarkunveno | *Katja* / *Franciska* | | Kantado | *Kit Kelen* | |
| 18:00 | Komuna | | | | | | |
| | vespermanĝo | Vespermanĝo | Vespermanĝo | Vespermanĝo | Vespermanĝo | Bankedo | |
| 19:00 | (pico) | | | | | | |
| | Esperanto- | Lud- | Kvizo | Vjetnama | Chihuly- | Teatraĵoj, | |
| 20:00 | filmetoj, | vespero | *Trevor* | vespero | ekzpozicio | Kantado, | |
| | Kantado, | | Cirkla danco | *Hoan* | Botanika | foto konkurso | |
| 21:00 | Babilado | Kantado | *Heather* | | Ĝardeno | | |

*Rimarku:* **[Z]** signifas, ke tiu sesio okazos per Zoom.
Por la ligilo, vizitu esperanto.org.au/eo/pri-ni/kongreso/kongreso-2025-zoom

## Dimanĉo, 5a de januaro

| | |
|---|---|
| 13:00 – 18:00 | Registrado |
| 18:00 – 19:30 | Komuna vespermanĝo *(Ni mem organizos)* |
| 19:30 – 22:00 | **Neformala babilado, filmetoj, kantado**<br>Ni montros kelkajn mallongajn Esperanto-filmojn.<br>Ankaŭ ***vi*** kunportu filmeton. |

## Lundo, 6a de januaro

| | |
|---|---|
| 07:00 – 08:30 | Matenmanĝo |
| **09:00 – 10:00** | **Malferma ceremonio** *(Estraro)*<br>Klarigoj pri la semajno, ekskursoj, manĝaĵoj, demandoj |
| 10:00 – 10:30 | Kafopaŭzo |
| **10:30 – 12:15** | **Esperanto-kursoj:**<br>**Komencantoj – Beginners** *(Sandor HORVATH)*<br>Baza kurso de Esperanto. Espereble – vendredon – vi povos partopreni en kelkaj dialogoj, legi kaj skribi simplajn mesaĝojn, ĝui la belecon de Esperanto kaj esti motivita daŭrigi la studon de la lingvo.<br>*Basic introduction to Esperanto. Hopefully – by Friday – you'll be able to engage in a few dialogues, read and write simple messages, enjoy the beauty of Esperanto and be motivated to continue studying the language.*<br>**Progresintoj** *(Hoan TRẦN – Ĝojo)*<br>Tiu ĉi kurso celas helpi al lernantoj pli memfide uzi la lingvon, plifortigi siajn gramatikon, utiligante diversajn ekzerco-tipojn kaj paroligajn aktivaĵojn.<br>**Spertuloj** *(Trevor STEELE)*<br>Tiujj sesioj estos kombinaĵo de prezentaĵoj pri tre diversaj historiaj temoj (ekz. pri la Romia Imperio, Attila la huno, Mahomedo kaj la originoj de Islamo, la mezepokaj krucmilitoj, kaj eventoj de la 20a jarcento), en kiuj la aŭskultantoj aktive partoprenos. Krom tio, Trevor prezentos diversajn dialogojn, gramatikajn ekzercojn tre diversspecajn, kiuj postulos almenaŭ mezgradan scion. |
| **12:15 – 12:30** | **Kongresa Foto #1** *(Kam LEE)*<br>Tiuj eventoj fariĝis legendaj. Ne estu senpacienca. Ĝuu la procezon. |
| 12:30 – 14:00 | Tagmanĝo |
| **14:00 – 15:00** | **Baza universala enspezo** *(Sandor HORVATH)*<br>Sandor esploros la ideon de baza universala enspezo. Bonvolu veni ankaŭ kun *via* opinio. |
| 15:00 – 15:30 | **Ĉu historio?** *(Helen PALMER)*<br>Kiel ni prezentas nian aŭstralian historion? Muzeoj de la regionoj: problemoj, defioj kaj novaj paŝoj. Interesaj perspektivoj. |
| 15:30 – 16:00 | Kafopaŭzo |
| 16:00 – 16:30 | **Kio estas la aŭstralia karaktero?** *(Charles STEVENSON)* |

| | |
|---|---|
| | Ĉu vere ekzistas distingaj aŭstraliaj trajtoj? Ĉu vere la aŭstralia kamaradeco ("mateship") naskiĝis en fremda Turkio, ĉe Galipoli? Aŭ ĉu kamaradeco estas universala homa karaktero? |
| 16:30 – 17:00 | **3ZZZ en Melburno: Kiel kontribui al nia Esperanta radio-programo** *(Franciska TOUBALE)*<br>La teamanoj de 3ZZZ foriras eksterlanden ĉiun jaron por ĉeesti diversajn kongresojn en julio kaj aŭgusto. Pro tio necesas antaŭprepari programojn. Unu el niaj eroj estas prezentado de verko originale verkita en Esperanto de iu aŭstralia verkisto. Ni registros la eltiraĵojn, kiuj estos elsenditaj poste. Do bonvolu helpi nin: venu legi la parton de unu el la roluloj de la romano. Antaŭdankon pro via helpo. Amikajn salutojn. |
| 17:00 – 18:00 | **AEA-Jarkunveno** – *Partopreno eblas ankaŭ per Zoom* **[Z]** |
| 18:00 – 19:30 | Vespermanĝo |
| **19:30 – 20:30** | **Ludvespero** *(Sandor HORVATH)*<br>Venu kaj ĝuu kelkajn simplajn amuzajn ludojn – ne hezitu, simple ludu, ridu kaj forgesu viajn kutimajn zorgojn! |
| **20:30 – 21:30** | **Kantado**<br>Staru aŭ sidu ĉirkaŭ la piano, kaj kantu pere de kantlibroj, kiujn ni provizos. Kaj komencantoj kaj operkantistoj estas bonvenaj! |

## Mardo, 7a de Januaro

| | |
|---|---|
| 07:00 – 08:30 | Matenmanĝo |
| **09:00 – 10:30** | **Esperanto-kursoj:**<br>**Komencantoj** – **Beginners** *(Sandor HORVATH)*<br>**Progresintoj** *(Hoan TRẦN)*<br>**Spertuloj** *(Trevor STEELE)* |
| 10:30 – 11:00 | Kafopaŭzo |
| **11:00 – 12:30** | **Esperanto-kursoj** |
| 12:30 – 14:00 | Tagmanĝo |
| **14:00 – 15:00** | **Kio okazas en Velingtono?** *(David RYAN)*<br>David esploros kelkajn problemojn en la nov-zelanda ĉefurbo, pri la disiĝanta loka registaro, tro da akvo, altaj vivkostoj, malkresko de la loĝantaro, ktp. |
| **14:00 – 15:00** | **3ZZZ: Legado por la radiostacio** *(Franciska Toubale)* |
| **15:00 – 15:30** | **Rakontoj kaj poemoj** *(Jonathan COOPER)* **[Z]**<br>Jonathan prezentos rakontojn kaj poemojn, kiujn li tradukis.<br>Poste, li iom parolos pri defioj traduki, aparte poezion. |
| 15:30 – 16:00 | Kafopaŭzo |
| **16:00 – 16:30** | **Kiel fari pli bonajn fotojn** *(Jonathan COOPER)* **[Z]**<br>Jonathan donos iujn konsilojn pri fotado, kiuj eble helpos pri la konkurso. |
| **16:30 – 18:00** | **Poŝtkartfarado** *(Katja STEELE)*<br>Kreado de unikaj poŝtkartoj kun Katja. |
| **16:30 – 18:00** | **3ZZZ: Legado por la radiostacio** *(Franciska Toubale)* |
| 18:00 – 19:30 | Vespermanĝo |
| **19:30 – 20:30** | **Kvizo** *(Trevor STEELE)*<br>Trevor defios vin per defiaj demandoj. |

| | |
|---|---|
| **20:30 – 21:30** | **Cirkla danco** *(Heather HELDZINGEN)* |

## Merkredo, 8a de januaro

| | |
|---|---|
| 07:00 – 08:30 | Matenmanĝo |
| **09:00 – 10:30** | **Esperanto-kursoj:**<br>**Komencantoj – Beginners** *(Sandor HORVATH)*<br>**Progresintoj** *(Hoan TRẦN)*<br>**Spertuloj** *(Trevor STEELE)* |
| 10:30 – 11:00 | Kafopaŭzo |
| **11:00 – 12:30** | **Esperanto-kursoj** |
| **12:30 – 18:00** | **Posttagmeza ekskurso al Glenelg** *(Helen PALMER)*<br>Ni vojaĝos per buso kaj tramo ĝis la maro. Ĉiuj mem faros kaj portos siajn tagmanĝojn. En Glenelg ni vizitos malgrandan muzeon (Bay Discovery Centre), poste promenos sur la marponto kaj plaĝo, naĝos, butikumos kaj "glaciaĵos"**.** |
| 18:00 – 19:30 | Vespermanĝo |
| **19:30 – 20:30** | **Vjetnama vespero** *(Hoan TRẦN)*<br>Venu kaj faru demandojn pri Vjetnamio. Lernu pri Vjetnamio. |

## Ĵaŭdo, 9a de januaro

| | |
|---|---|
| 07:00 – 08:30 | Matenmanĝo |
| **09:00 – 10:30** | **Esperanto-kursoj:**<br>**Komencantoj – Beginners** *(Sandor HORVATH)*<br>**Progresintoj** *(Hoan TRẦN)*<br>**Spertuloj** *(Trevor STEELE)* |
| 10:30 – 11:00 | Kafopaŭzo |
| **11:00 – 12:15** | **Esperanto-kursoj** |
| **12:15 – 12:30** | ***Kongresa foto #2*** |
| 12:30 – 14:00 | Tagmanĝo |
| **14:00 – 15:00** | **La epoko de l' elektro** *(Benno LANG)*<br>La moderna magio de la elektro – la plej utila speco de energio, kaj la solvo de tiom da problemoj. Ni jam havis la elektron dum pli ol du jarcentoj. Nun komenciĝas la vera epoko de l' elektro! |
| **15:00 – 15:30** | **Popoloj de Kavel – germanaj migrantoj de Sud-Aŭstralio en la 19a jarcento** (*Marumi SMITH)*<br>Ne nur kolbasoj, biero kaj bongustaj kukoj. Marumi esploros kelkajn aspektojn de la germana kontribuo al la aŭstralia evoluo. |
| 15:30 – 16:00 | Kafopaŭzo |
| **16:00 – 17:00** | **Kvar kantoj** *(Kam LEE)*<br>La prezentado temos pri la lirikoj de modernaj kaj rokmuzikaj kantoj, kaj informo pri la kantistoj. La prelego estas utila por tiuj, kiuj deziras verki kantojn kaj tiuj, kiuj ĝenerale interesiĝas pri kantaj lirikoj. La diskutotaj kantoj konsistas de du originalaj Esperantaj kantoj kaj du tradukoj.<br>*1.* ***La pluvo*** *(La lluvia)* kantita de Maria Villalon, verkita de Carlos Matari<br>www.youtube.com/watch?v=fOBkKcbJUAE |

| | |
|---|---|
| | 2. ***Pluvo kaj vivo*** kantita de Tim Gallego www.youtube.com/watch?v=wFYz-_NF5IQ<br>3. ***Ni estas fortaj*** kantita de Jonny M www.youtube.com/watch?v=C7-xk6He0nM<br>4. ***Mozaiko*** kantita de Kjara (Chiara Raggi), tradukita kaj adaptita de Federico Gobbo www.youtube.com/watch?v=gWTtpryE9GA |
| **16:00 – 17:00** | **3ZZZ: Legado por la radiostacio** *(Franciska Toubale)* |
| **17:00 – 17:30** | **Bona Kanbero** *(Sarah kaj Helen PALMER)*<br>Sarah kaj Helen esploros pri kio estas bona pri Kanbero, nia ĉefurbo. |
| **17:30 – 18:00** | **Kantado** |
| 18:00 – 19:30 | Vespermanĝo |
| **19:15 – 22:00** | **Chihuly-ekspozicio** *(Helen PALMER)*<br>Estu hipnotigita de drame lumigitaj vitraj skulptaĵoj en la Botanika Ĝardeno. Kromkosto: $18.00. Estas 20 spacoj. – aliĝu per Helen. (www.botanicgardens.sa.gov.au/chihuly, www.botanicgardens.sa.gov.au/whats-on/chihuly-nights) |

## Vendredo, 10a de januaro

| | |
|---|---|
| 07:00 – 08:30 | Matenmanĝo |
| **09:00 – 10:30** | **Esperanto-kursoj:**<br>**Komencantoj – Beginners** *(Sandor HORVATH)*<br>**Progresintoj** *(Hoan TRẦN)*<br>**Spertuloj** *(Trevor STEELE)* |
| 10:30 – 11:00 | Kafopaŭzo |
| **11:00 – 12:30** | **Esperanto-kursoj** |
| 12:30 – 13:30 | Tagmanĝo |
| **14:00 – 14:30** | **La Universala Kongreso en Aruŝo** *(Heather HEDZINGEN)*<br>Heather dividos siajn spertojn antaŭ, dum kaj post la unua UK en Afriko. |
| **14:30 – 15:00** | **Taglibro de mia vojaĝo al la UK en Aruŝo** *(Vere WILLIAMS)*<br>Rakonto laŭ la taglibro, kiun Vere faris dum sia unua UK. |
| **15:00 – 15:30** | **La skota lingvo (***William GEORGESON***)**<br>William klarigos la bazan ideon de la skota lingvo**.** |
| 15:30 – 16:00 | Kafopaŭzo |
| **16:00 – 17:00** | **Alternativa Diservo** *(Trevor STEELE)*<br>Partoprenantoj estas invitataj voĉe kontribui inspirantajn legaĵojn, de iu ajn religio, libro aŭ alia fonto. Kvankam bazita sur religia praktiko, tiu sesio estas malferma al ĉiu, ĉu religia aŭ nereligia." |
| **17:00 – 18:00** | **Horo da dulingva poezio** *(Kit Kelen)* **[Z]**<br>Kit Kelen legas el sia propra verko kaj el poemoj kolektitaj por la antologio de aŭstralia kaj nov-zelanda poezio, kiun li nuntempe redaktas. (En la angla kaj Esperanto) |
| **18:00 – 22:00** | **Bankedo:** Atestiloj, teatraĵoj, foto-konkurso, kantado |

## Sabato, 11a de januaro

| | |
|---|---|
| 07:00 – 08:30 | Matenmanĝo |
| 09:00 – | **Forveturo: Bonan vojaĝon!** |

# LA ESPERO

1.

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.
Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la homan tiras familion:
Al la mond' eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.

2.

Sub la sankta signo de l' espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantoj.
Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.

3.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.
Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos,
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro
*Por eterna ben' efektiviĝos.*